

Hector Hodler, 8-a parto : 20-a jubileo de esperanto; *Festa kanto*
Claude Gacond, 351-a radioprelego, 1970.07.01 & 04

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Dum kelkaj monatoj ni turnos nian atenton al la vivo, penso kaj verkaro de Hector Hodler, unu el niaj valoraj verkistoj.

A.- Dum la du pasintaj semajnoj ni havis la okazon prezenti al vi la unuan numeron de la gazeto *Esperanto* redaktita de Hector Hodler. Ĝi aperis la 12-an de februaro 1907.

Cl.- Kiel Hector Hodler, la lingvo internacia esperanto festis en 1907 sian dudekan naskiĝjaron. Aŭ pli bone, estas la esperantistoj en la tuta mondo, kiuj festis tiun jubileon, organizante en plej diversaj lokoj manifestaciojn, tio grandparte sub la instigo de Hector Hodler.

A.- Jen kion li skribis en la gazeto *Esperanto* de la 27-a de aprilo 1907 :

Cl.- « *Jaro 1907 signas, kiel scias ĉiu ajn esperantisto, la dudekan jubileon de Esperanto. Kelkaj personoj opinias – kaj prave – ke oni ne devas preterlasi tiun jaron, ne organizante ian komunan internacian feston, en kiu partoprenos ĉiuj grupoj kaj ĉiuj samideanoj dissemitaj tra la tuta mondo.*

A.- *Sed por tia rememora festo, kian tagon elekti ? Post diversaj enketoj, oni opiniis, ke la 21-a de julio, tago en kiu povis publike eliri la unua broŝuro subskribita de D-ro Esperanto, estas la plej bona, ĉar ĝi estas dimanĉo kaj okazas ĝuste antaŭ la kongreso.*

Cl.- *Se do tiun tagon kunfestas ĉiuj esperantistoj, tio ĉi krom la plezuro ricevebla de ĉiuj, favore impresos la publikon kaj altiros ĝian atenton al la Kembriĝa kongreso, kiu fakte estos la vera jubileo de nia afero.*

A.- *Estas tre dezirinde, ke ĉiuj grupoj prifestu inde tiun gloran tagon, kiun povos ĝui ĉiuj, dum la kongreso estas per si mem difinita al elektitaro inter la esperantistoj.* »

Cl.- La numero de la 12-a de julio 1907 de la gazeto *Esperanto* festas la **20-an jubileon de esperanto** per longaj artikoloj de Hector Hodler : frontartikolo titolita **Jubileo de Esperanto**, poemo titolita **Festa kanto** kaj **Historio de esperanto**.

A.- Sekvas, sub titolo **Gravaj verkoj**, teksto de Zamenhof ĉerpita el la verko **Aldono de la Dua Libro**.

Cl.- Ni opinias, ke valoras citi erojn el tiuj tekstoj. Ili bone respegulas la atmosferon, en kiu disvolviĝis la tiama esperantismo. Por komenci ni legos al vi la poemon **Festa kanto** de Hector Hodler. Estas poeziaĵo pli folkloro ol vere arta. Tamen ĝi bone respegulas la tiaman spiritostaton de la aktiva esperantistaro.

A.- *Laŭtiĝu tra l' mondo, fervoraj paroloj !
Kunigu gentanojn, vin aŭdu popoloj !
Jam venis la tempo por ĝoja konsento ;
Foriĝu malamo kaj mortu turmento !
Hodiaŭ ni festas ; ripozu l' armiloj ;
Konduku nin foren esperaj flugiloj !*

Cl.- *Bariloj jarcentaj disigis homidojn,
Vokante malpacojn, semante dividojn.
Malĥore dissonis popolaj esperoj
Kaj revoj profetaj, kaj homaj suferoj
Al samo nacioj instinkte kuncelis*

Sed voĉoj eraris kaj amon forpelis.

- A.- *Sur kampoj apartaj de unu la tero,
Homaro plugadis kun bela espero ;
Dum fruktojn kreskigis la homa penado,
Naturon enĉizis genia kreado,
Per longa batalo, post akra laboro,
Al mondo naskiĝis eterna trezoro.*
- Cl.- *Sub frapoj geniaj forfalis malvero,
Tra noktaj konfuzoj ekbrilis libero,
Konsciis popoloj pri unu homaro,
Sed ilin fremdigis fortika remparo,
Kaj kvankam la koroj sampense kunsonis,
Senfrukte paroloj fratige admonis.*
- A.- *Jen, homo aperis, de l' sorto signita,
Oferis li vivon al cel' difinita
El dissonoreco de l' kantoj naciaj
Ŝprucigis li himnon komunharmonian
Al sankta espero pri bono kaj vero,
Konstanta gvidilo de l' homo sur tero.*
- Cl.- *El formoj ŝanĝemaj de densa teksaĵo,
Dum longaj jarcentoj konfuza plektaĵo,
Li ŝtofon komunan kaj simplan eltiris,
Kaj kreskojn sencelajn, balastajn forŝiris,
Ĉar homo rigardas multformon eksteran,
Dum celas genio esencon internan.*
- A.- *Al kanto tutmonda li donis liberon,
Flugeman flekseblon, logikan severon,
Kaj ĉarmo potenca de bela sonoro
Ornamis la voĉon de l' nova trezoro.
Enblovis li vivon en ŝtofan kreiton,
Al Vorto li kreis memstaran spiriton.*
- Cl.- *Senbrue ĝi iris, sur voj' malfavora,
Konstante puŝata de bando fervora ;
Malgranda l' anaro, kun forta animo,
Por celo batalis kun brava maltimo,
Silentis la mondo, sed ĉiam semadis
Bandanoj senlacaj, kaj baroj krakadis.*
- A.- *Jen frapis rideto, jen mokis skeptiko,
Aŭ neis klerulo per saĝa prediko,
Spritistoj publikaj, profetoj konataj,
Ĝin trafis per sagoj de vortoj kompataj.
Sed flugis l' ideo tra vasta la tero,
Ĉar bandon vigligis venkanta sincero.*
- Cl.- *Tra tuta landaro la kanto nun sonas ;
Ekaŭdas la homoj, ĝin gentoj ekkonas.*

*Sur fundon kuŝiĝas profetoj eraraj,
Kaj vane baraktas imitoj barbaraj.
Per tasko senhalta, konvinke obstina,
Jam venos rapide triumfo la fina.*

A.- *En vesto ĉiela, ekbrilas la stelo
Ĉe kies heleco ni iras al celo.
Ĝi brilas pli forte post ĉiu paŝado,
kaj baldaŭ radios per suna lumado.
La stela potenco malhelpojn forpelos,
La teron ĝi prenos, kaj murojn ŝancelos.*

Cl.- *Por venkon certigi, ho, fratoj laboru !
Ni lastajn barilojn por ĉiam traboru.
Al tasko humila, sin ĉiu proponu,
Nenian armilon al laco fordonu,
Ĝis montojn erarajn faligos la vero,
Kaj revo la nia korpiĝos sur tero.*

A.- Vi aŭdis tiun longan poemon **Festa kanto** de Hector Hodler. Ĝin aŭskultante vi certe konsciis, ke la juna redaktoro de la gazeto *Esperanto* ne malkovrigis grandan poetan talenton. Poezio ne nur estas observado de iu versa ritmo kaj de rimaĵoj. Ĝi estas multo pli, kaj tiun nivelon bedaŭrinde ne atingis la versaĵoj de Hector Hodler.

Cl.- Ni troviĝas antaŭ speco de folkloriĝo, kies simboloj nun estas al ni fremdaj, ĉar ni ne plu vivas en la sama atmosfero de fervoro, espero kaj revemo.

A.- La venontan semajnon ni legos al vi erojn el la prozaj tekstoj de Hector Hodler.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-